



LA DEKSEPA



Organe Mensuel Espérantiste.

RÉDACTION ET ADMINISTRATION : **H. de COPPET**
179, Boulevard Pereire, Paris.

ABONNEMENT : *France*, 1 franc. — *Etranger*, 1 fr. 50 par an.
Ne paraît pas en Août et Septembre.

TARIF DES ANNONCES :

Une année : 1/4 page, 40 fr. ; 1/2 page, 70 fr. ; une page, 120 fr.

Grupo Fundamentista « La Dek-Sepa ».

Groupe Espérantiste du XVII^e Arrondissement de Paris.

SIÈGE SOCIAL : 179, Boulevard Pereire, Paris.

Prochaines Causeries.

Salle Villiers, 64, rue du Rocher, Paris.

- 1^{er} Avril. — Les environs de Paris. Des rives de la Seine à la plaine de la Beauce, par M. Gilbert Daniel. — 57 projections du Touring-Club de France.
- 8 Avril. — Discussion publique en Esperanto.
- 15 Avril. — Le Jura Suisse. Projections lumineuses. — M. Henri de Coppet.
- 22 Avril. — Bourbonnais, Berry, Sologne, par M. Robert Bollack. 60 projections du Touring-Club de France.
- 29 Avril. — Soirée récréative artistique et dansante.

Le secrétaire,

ROBERT BOLLACK.

GRUPO FUNDAMENTISTA « LA DEK-SEPA »

Depuis Janvier 1914 les réunions de notre Groupe ont lieu tous les Mercredis, à 21 h., **SALLE VILLIERS, 64, rue du Rocher, à Paris (Métro: Villiers, Europe ou Saint-Lazare), dans un local particulier au 5^e étage. — Ascenseur. — Téléphone : Wagram 81-54.**

Tous les Mercredis causeries ou discussions en Esperanto, jeux, musique.

Tous les Espérantistes y sont cordialement invités.



Dixième Congrès Universel d'Esperanto

Paris — 2-10 Août 1914

Le Congrès aura lieu dans le « Gaumont-Palace », rue Caulaincourt - place Clichy.

La carte du Congrès coûte 15 francs et 25 francs pour les personnes qui s'inscriront après le 1^{er} Juin 1914. La femme et les enfants d'un congressiste paieront par personne 10 francs ou 20 francs après le 1^{er} Juin 1914. Ces derniers congressistes n'auront pas droit aux documents du Congrès.

Les adhésions sont reçues tous les Mercredis soir aux réunions de la « Grupo Fundamentista La Dek-Sepa », Salle Villiers, 64, rue du Rocher, Paris.



Dek-Sepanoj aliĝu! Per via tuja aliĝo vi montros vian firman deziron sukcesigi tiun internacian festaron!

Vivu la Dekaaa!!!



L'Esperanto à Paris et en France

La prochaine réunion des groupes indépendants aura lieu le Vendredi 3 Avril 1914, au siège des réunions de « Verda Stelo », Groupe Espérantiste de Montmartre, 129, rue Marcadet, Paris, à 21 heures.

Quelques espérantistes se réunissent pour déjeuner, tous les jeudis, au Restaurant de la Place Clichy (8, place Clichy, Paris). M. Jacques Camescasse, délégué de l'U. E. A. à Paris, s'y trouve tous les jeudis. (Demander la Table Espérantiste au premier étage.)

Le Conseil Municipal de Paris et le Conseil Général de la Seine viennent de voter une subvention pour le Dixième Congrès Espérantiste.

L'Association Commerciale et Industrielle Espérantiste organisera, pendant le Dixième Congrès Universel d'Esperanto, une Exposition. Les commerçants qui désireraient exposer, sont priés de s'adresser au Président de l'Association, M. Leclerc, 71, rue Monge, Paris.

Dum la lasta kunsido de E. S. F. I. O. la sekretario raportis pri la kunvenoj en Laborborso. De nun funkcias la Franca Laborista Esp. Unuiĝo, kies sidejo estas 121, rue de la Convention, Paris. La kunvenoj okazas samtempe kun tiuj de la Komitato por organizo de la Laborista Kongreso. Oni decidis, ke la akcepta kunveno okazu la 2. de Aŭgusto kaj dum la semajno publika mitingo. La partoprenontaj kamaradoj bonvolu sendi sian adreson al « Le Travailleur Espérantiste », 121, rue de la Convention, Paris.



Châlon-s.-S.: La urbkonsilantaro voĉdonis monhelpon por la grupo. — *Cholet*: La grupo aranĝis la 8. de Februaro belan feston kun balo. — *Grenoble*: Estas gvidataj 13 kursoj: 10 oficialaj en urbaj lernejoj kun 200 lernantoj, 2 oficialaj en la Asocio de eksterlerneja instruado kaj unu en la Esp. Societo. — *Limoges*: La 29. de Januaro S-ro G. Lelarge el Poitiers faris antaŭ 150 gejunuloj propagandan paroladon pri Esperanto kaj U. E. A. — *Mâcon*: La urbkonsilantaro konsentis monhelpon al la grupo.



La personeraroj de Lambinet

De H. Meilhac kaj Lud. Halévy.

Komedieto en unu akto, ludita ĉe unu el la festoj de « La Dek-Septa ».

(Daŭrigo)

SCENO VI-A

JOSEFO, — *poste* LAMBINET, S-ino LAMBINET kaj
MARGARETO kaj FANĈETO.

JOSEFO (*sola*). — Li eliras por serĉi ilin... ne estas mastro, kiun mi trovis, estas amiko... eĉ frato... Se la edzino kaj la filino similas lin... mi ekstarigos al mi novan familion. (*Vidante S-ron kaj S-inon Lambinet kaj Margareton, kiuj eniras*) Ha, jen estas ili! (*ili alvenas de la maldekstra flanko*).

LAMBINET (*prezentante sian edzinon kaj sian filinon al Josefo*). — Mia edzino... mia filino...

JOSEFO (*salutante*). — Sinjorino... fraŭlino...

LAMBINET (*ridetante, al Josefo*). — Nu?...

JOSEFO (*ridetante*). — Nu?...

LAMBINET (*mallaŭte*). — Ĉu ŝi plaĉas al vi?

JOSEFO (*mallaŭte*). — Sinjorino Lambinet?

LAMBINET (*mallaŭte*). — Ne... Sinjorino Lambinet iam estis tre alloga persono... sed vi komprenas, ke nun, post dudek kvin jaroj da geedza vivado....

JOSEFO (*mallaŭte*). — Ŝi ankoraŭ tre bone elrigardas.

LAMBINET (*mallaŭte*). — Mi parolas al vi pri mia filino.

JOSEFO (*mallaŭte*). — Ĉarplena ŝi estas.

LAMBINET (*mallaŭte*). — Bone, ŝi plaĉas al vi.... Nu, ĉio aranĝigas. Mi tuj demandas al ŝi, kion ŝi pensas pri vi. (*Li aliras al sia filino. Sinjorino Lambinet rondiras ĉirkaŭ Josefo, kiun ŝi senĉese estas rigardanta, jam de la komencigo de la sceno.*)

JOSEFO (*aparte*). — La patrino detalas min.

LAMBINET (*mallaŭte al Margareto, kiu atente rigardas Josefon*). — Nu, kion ci pensas pri li?

MARGARETO (*mallaŭte*). — Li ne malplaĉas al mi.

LAMBINET. — Perfekte, perfekte! (*Alirante al Josefo, kiu restas miregita sub la rigardoj de Margareto kaj de S-ino Lambinet*) Vi plaĉas, vi plaĉas, havu kuraĝon... nu, antaŭen... antaŭen....

JOSEFO (*al Lambinet*). — La sinjorino min vokas.

S-ino LAMBINET (*alproksimiĝante Josefon, kun emocio*). — Mi dezirus diri al vi kelkajn vortojn aparte, sinjoro. (*Al Lambinet*) Ĉu ci permesas, amiko mia?

LAMBINET. — Tre certe.

JOSEFO. — La sinjoro permesas....

S-ino LAMBINET (*al Josefo*). — Vi certe komprenos mian konfuzon. En tiu ĉi momento io solena plenumiĝas... vi tuj vidos mian filinon... vi alparolos al ŝi... kaj estas ŝi, kiu solvos.... Ŝia patro kaj mi, ni firme decidis lasi sin absolute libera... kaj estas nur kun ŝia konsento, ke vi estas akceptata en nia domo.... Sed, permesu, ke mi iom parolu al vi pri Margareto... estas la devo... la dolĉa devo de patrino... (*Tute kortuŝita*) Estas infaneto, infaneto, sinjoro. Ŝi nur vidis en nia hejmo bonajn manierojn kaj ŝi ricevis, en unu el niaj plej bonaj edukejoj, plenan instruadon. (*Kun larmoj en la voĉo*) Kaj se la fortepiano estus al vi malagrabla, ŝi rezignus ĝin. Jen, sinjoro, ĉio, kion mi havis por diri al vi. (*Ŝi viŝas siajn okulojn.*)

JOSEFO (*emociigita, aparte*). — Malfeliĉulino!

LAMBINET. — Ĉu estas finita, Gertrudo?

S-ino LAMBINET. — Jes, karulo.

LAMBINET (*al Josefo*). — Nu, nun, ke la prezentoj estas faritaj, iru babiladi kun Margareto.... Iru, tute sola... ni permesas.

S-ino LAMBINET. — Jes, sinjoro, ni permesas.

JOSEFO (*aparte*). — Vere, ŝajnas grava afero por ili dungi serviston... (*li alproksimiĝas al Margareto, kiu ŝajnas tre agitata. S-ro Lambinet kaj S-ino Lambinet, kiuj staras aparte, kuraĝigas Josefon per rigardoj. Al Margareto*) Mi scias, fraŭlino, ke mia estonteco dependas de via konsento. Mi esperas, ke vi ĝin ne rifuzos. Mi povas certigi al vi mian fervoron, mian respekton kaj mian obeemon. Mi ĉiam restos kontraŭ vi via plej diligenta kaj sindonema servisto.

MARGARETO (*aparte*). — Li elegante parolas. (*Al sia patrino*) Ĉu estas permesate al mi respondi, panjo?

S-INO LAMBINET (*kun emocio*). — Jes, filino mia.

MARGARETO. — Mi ne dubas, sinjoro, pri la sincereco de viaj protestoj, sed vi komprenos, ke estas malfacile prenituj decidon; necese estas, ke vi sciigu, kiu mi estas, kaj mia parte, ke mi estu instruita pri vi mem.

JOSEFO (*aparte*). — Versajne, nur post provo mi estos akceptata.

MARGARETO. — Se ni ambaŭ konvinkiĝas, ke ni povos farigi feliĉaj unu apud la alia, estas kun granda ĝojo, ke mi diros al vi: Restu... Ĉu vi akceptas tiun eksperimenton?

JOSEFO. — Se tiel plaĉas al vi, mi volonte akceptas, kaj mi esperas, ke mia fervoro kontentigos vin.

LAMBINET (*al sia edzino*). — Mi tuj akcelos la aferon. (*Laŭte*) Estas bele, anstataŭ resti tie ĉi, kial do ni ne elirus kvarope?

S-INO LAMBINET. — Volonte, karulo mia.

JOSEFO (*aparte*). — Kiel? mi ankaŭ kuniras?

LAMBINET (*alvokante*). — Fanceto... Fanceto... (*Fanceto alvenas sur la dekstra flanko*). Alportu la ŝalojn kaj ĉapelojn de sinjorino kaj fraŭlino... (*Fanceto eliras maldekstren kaj tuj revenas kun la ŝaloj kaj ĉapeloj. Sinjorino Lambinet kaj sia filino direktiĝas sur la fndon de l' sceno por ilin vesti, helpataj de Fanceto.*) Ni tuj iros viziti loĝejojn. Mi jam rimarkis unu, kiu plaĉas al mi... strato Rivoli, apud la urbdomo... Bela kvartalo, ne vere?

JOSEFO. — Certe... certe... estas apud la Granda Vendejo, tre oportuna por sin provizi.

LAMBINET. — Bedaŭrinde, ĝi estas iom alte lokita... sur la kvara etaĝo.

JOSEFO. — Jes, por suprenporti lignon kaj la vinon estas iom lacige, tamen estas nur bagatelo.

LAMBINET. — Kompense, ekzistas granda balkono.

JOSEFO. — Bonega por purigi la tapiŝojn. Oni vekigas frue, oni skuas ilin antaŭ ol la policianoj ellitiĝu.

LAMBINET. — Mi konstatas kun plezuro, ke vi estas ordema viro. Vi pensas pri la plej etaj aferoj... La provizaĵoj... la ligno... la vino... la tapiŝoj...

JOSEFO. — Estas devige (*li eltiras la broson el sia poŝo kaj ekbrosas Lambinet*).

LAMBINET (*eltirante al li la broson*). — He! mi ne

toleros.... (*li sin brosas kaj brosas Josefon, kiu vane defendas sin; poste li remetas la broson sur la maldekstran apogoseĝon*).

S-ino LAMBINET (*antaŭvenante kun sia filino*). — Ni estas pretaj, mia amiko. (*Fanĉeto eliras sur la maldekstra flanko.*)

LAMBINET. — Nu, ni foriru... (*Al Josefo*) Proponu vian brakon al mia filino.

JOSEFO (*aparte*). — Vere estas frenezulo. (*Mallaŭte*) Mi certigas al vi, ke tio ne estus deca.

LAMBINET (*mallaŭte*). — Eble, vi estas prava... (*laŭte*) Proponu ĝin al mia edzino... kun ŝi okazos neniaj konsekvencoj. (*Li proponas sian brakon al sia filino.*)

JOSEFO (*aparte*). — Mankis al mia kolekto servi frenezulon.... (*Proponante sian brakon al S-ino Lambinet*) Sinjorino....

SCENO VIII-A

FANĈETO.

Nu, je l'honoro, estas indigne!... Ili ĉiuj interkonsentas, post unu horo... nekredeble!... Necese estas, ke mi alportu la likvorojn en la mangoĉambron (*ŝi prenas la likvorujon, kiun ŝi metas sur la tableton kaj viŝas la glasetojn*). Fraŭlino Margareto havis kontentplenan rideton sur la lipoj. Ha! kun mi, oni ne tiel agus. Antaŭ unu jaro, la pordisto volis, ke mi edziniĝu kun granda malgrasulo, kiu multe monŝparis.... Mi postulis vidi la malgrasulon... kaj, unu fojon, li venis tien ĉi kiel piulo.... Dum mi metis malvarmajn trinkaĵojn sur glasportilon, mi vidis lin, kiu ankaŭ prenis alian, kaj metis sur ĝin malplenajn glasojn... kompreneble, mi demandis lin, kion li intencis fari kun ili? Li tuj respondis: Estos por la personoj, kiuj nenion trinkos. Vi komprenas, ke tio sufiĉis. (*Oni sonoras*) Ha! sendube estas la kukisto (*ŝi metas la buŝtukon sur la tableton kaj iras por malfermi*).

SCENO VIII-A

BERLURON, FANĈETO.

FANĈETO. — Ne, estas S-ro Berluron.

BERLURON. — Ĉu Sinjoro Lambinet estas hejme?

FANĈETO. — Ne, sinjoro.

BERLURON. — Kaj Sinjorino Lambinet ?

FANĈETO. — Ne, sinjoro.

BERLURON. — Kaj Fraŭlino Margareto ?

FANĈETO. — Ne, sinjoro.

BERLURON. — Ĉu ili baldaŭ revenos ?

FANĈETO. — Atendu, vi mem vidos.

SCENO IX-A

BERLURON, *poste* GUSTAVO.

BERLURON (*sola*). — Ŝi ne estas afabla.... Atendi?... atendi.... Mi tre bezonas rapidi. (*Rigardante ĉirkaŭ si*) Nu... kie li estas? Gustavo! Gustavo! (*li malfermas la pordon sur la fundo, ekaperas Gustavo*).

GUSTAVO (*tre emociigita*). — Jen mi estas.

BERLURON. — Eniru do, kion vi havas ?

GUSTAVO. — Trapasante la salonon, mi ekvidis portreton. Tiam, laŭ la fotografaĵo, kiun vi sendis al mi, mi rekonis, ke estas ŝi, Sinjoro Berluron, estas ŝi!...

BERLURON (*skuante lin*). — Nu, nu, ne kortuŝigu!... Vi scias, ke mi devas rapidi. Rekonsciigu kaj ĝis revido!

GUSTAVO. — Kiel, ĝis revido; sed vi devas prezenti min.

BERLURON. — Neeble, kara amiko, neeble, mi ne povas atendi. Mi havas rendezuon je la tria... vi prezentos mem.

GUSTAVO. — Ho! mi petegas vin, Sinjoro Berluron, ne forlasu min. La neordinara emocio, kiun mi eksentas en tiu momento, pligrandigas mian naturan timecon.

BERLURON. — Infanaĵoj! Vi havas nur du frazojn por diri: « Estas mi, Gustavo Bricard, la amiko de Berluron ». La bopatro malfermos al vi siajn brakojn, vi enfalos en ilin, kaj estas finita la komedio.

GUSTAVO. — Jes, sed almenaŭ estus necesege, ke mi sciigu... Kia homo estas mia estonta bopatro ?

BERLURON. — Bonegulo... iom gajema... iom ŝercema.

GUSTAVO. — Ne estas li, kiu maltrankviligas min... tre timema mi estas kun virinoj, sed, kontraŭe, gajega kun viroj... kaj mi eĉ faris kelkajn petolaĵojn dum mia vivo. Pri tio vi povas informiĝi en « Sankta Malo », kaj vi ekscios, kion oni rakontos al vi pri mi.

BERLURON. — Ho! mi ne havas la necesan tempon por fari la vojaĝon.... Ĝis revido... ĝis revido....

GUSTAVO. — Restu, mi vin petegas.

BERLURON. — Mi revenos tien ĉi por vespermanĝi....
Avertu ilin.

GUSTAVO (*lin sekvoante*). — Mi certigas vin, ke mi eksentas timegon... nekredeblan timegon.

BERLURON. — Ĝis revido! (*li eliras sur la fundo*).

SCENO X-A

GUSTAVO

Ĉu vera amiko tiel agus! Lasi min tute sola fari mian unuan viziton.... Kiel mi kontraŭstaros ŝiajn rigardojn.... al ŝi... kiam la simpla ekvido de ŝia portreto.... Jam la fotografaĵo ĉarmis min... certe, la originalo mortigos min.... Mi ne scias, kio okazas ĉe mi... mi eksentas malvarman ŝviton inter la ŝultroj.... Ŝajnas al mi, ke mi baldaŭ eksvenos.... Ho! necese estas, ke mi trinku ion ajn.... Ho! (*ekvidante la karafon*) Ha!... (*li kuras al la kameno, ekaptas ĝin, plenigas glason per akvo, sed, en lia malkvieteco, li troplenigas la glason kaj disverŝas teren la duonon de la karafo*). Glaso plena je akvo rebonigos min. (*Vidante kion li faris*) Ha! granda Dio! mi disverŝis la tutan karafon sur la tableton kaj sur la tapiŝon! Bela komenco por prezentigi en domo.... Kion fari? (*li remetas la karafon kaj ekvidas viŝilon sur la tableto*) Ha! Dank' al Dio! jen, estas viŝilo! (*Li prenas la viŝilon kaj eksorbas la akvon, kaŭriginta sur la tero. Dume, eniras elvenante el la fundo Lambinet, li ne vidas Gustavon, kiu estas kaŝita de la tableto*).

SCENO. XI-A

LAMBINET, GUSTAVO.

LAMBINET (*enirante*). — La apartemento estas luita.... Ĝi plaĉis al li... Mi sendis ilin triope ĉe la onklinon « Buchon »... la deco postulis, ke oni faru al ŝi viziton.... Ŝi estas tedega, la onklino « Buchon »... kaj kompreneble, mi evitis la dejoron... (*li ekvidas Gustavon, kiu sur la ventro elviŝas kaj frotas la tapiŝon*). Kio estas tie?

GUSTAVO (*aparte*). — Venas iu... nun, oni ekvidis min!

LAMBINET (*al Gustavo, kaŭrigante apud li*). — Kion vi faras tie?

GUSTAVO (*aparte*). — La bopatro, sendube (*li salutas per kapsigno kaj restas en la sama pozicio*).

LAMBINET. — Ĉu vi intencas respondi?

GUSTAVO. — Nu, Sinjoro.... Estis akvo disversita... sur la tapiŝo... tiam mi ensorbis ĝin....

LAMBINET. — Tion mi bone vidas, sed kiu vi estas?

GUSTAVO (*emociita*). — Kiu mi estas.... tion vi ne divenas? Mi estas rekomendita al vi de S-ro Berluron. (*Dirante tiujn vortojn, li malrapide sin relevas, tiel same kiel Lambinet, kiu faris la saman movon.*)

LAMBINET. — Ha! en la nomo de S-ro Berluron.... Bone... Bone... mi scias. (*Aparte*) Laŭ lia ĝenita teniĝo... lia malsprita vizaĝo... lia maleleganta vestiĝo... nenia dubo... estas la servisto... ĉar ĉe mi, mia unua antaŭjuĝo nepre trafas. (*Al Gustavo, kiu tordas la viŝilon trempigitan, kiun li tenas en la manoj*) Nu, nu, kion vi faras nun?

GUSTAVO. — Nenion... ĝi estis akvoplana kaj mi tordas ĝin.... (*li tordas la viŝilon*).

LAMBINET. — Vi estas malprava.... (*Eltirante al li la buŝtukon*) Vi do ne vidas, ke estas damasita buŝtuko, kiun vi entenas!!...

GUSTAVO. — Jes, sinjoro, estas buŝtuko... (*li malsprite ridas*).

LAMBINET. — Nenio ridinda en tio.... Pli bone estus, se vi estus petinta viŝilon. (*Li iras demeti la buŝtukon sur la ŝrankon sur la fundo maldekstren*).

GUSTAVO (*aparte*). — Vere, li strange akceptas min, la bopatro!

LAMBINET (*revenante al li*). — Nu, venu... alproksimiĝu, ke mi vin iom ekzamenu.

GUSTAVO (*alproksimigante kun embarasata mieno*). — Jes, sinjoro.

LAMBINET (*palpante al li la brakon kaj la kruron, kio lin iom faletigas*). — Hum! vi ne elŝajnas tre fortika.

GUSTAVO. — Verdire, mi ne estas tre forta, sed, mi ĝuas bonan sanon.

LAMBINET. — Estas certe konsiderinda. Marŝu iom, tie, antaŭ mi.

(*Daŭrigota.*)

Tradukis HENRI DE COPPET.



N.-B. — La Rédaction de *La Dek-Sepa* désire acheter les Numéros suivants : N° 2 (Janvier 1911); N° 7 (Juin 1911); N° 12 (Janvier 1912); N° 13 (Février 1912); N° 14 (Mars 1912); N° 24 (Mars 1913).

OUVRAGES de M. Henri de Coppet.

En vente à la Rédaction de « La Dek-Sepa ».

- L'Esperanto appris sans maître en 45 leçons fr. 1,50
Recueil de phrases, édition Française-Esperanto, plus de
2800 phrases de la vie usuelle fr. 1,80
L'Espero, hymne espérantiste de D-ro L. L. Zamenhof,
édition pour tenor ou soprano fr. 1,50

LA VERA TIZANO DE L' PASTRO DE DEUIL

preparita de S-ro Duvergier, en Argenteuil, mirinde efikas kontraŭ ĉiuj doloroj, reŭmatismoj, neŭralgioj, kontraŭ la aĝ-atakoj, la mallakso kaj la grasegeco.

La paketo : 1 Fr. 50 (Sm. 0,60

===== Tuj ricevebla kontraŭ poŝtmandato. =====

Specimeno kaj broŝuro senditaj senpage tuj post demando al
S-ro DUVERGIER, 9, Rue Laffitte, Paris.

La plej malnova el ĉiuj gazetoj Esperantistaj

FONDITA EN 1895

LINGVO INTERNACIA

CENTRA ORGANO DE LA ESPERANTISTOJ

Ĉefredaktoro : TH. CART.

40 + 8 paĝoj. — Aperas regule ĉiumonate.

Jara abono : 5 fr. (2 S). — Unu numero : 0 fr. 50 (0 S 200).
Por ricevi specimenon oni sendu unu respondkuponon.

LINGVO INTERNACIA kaj JUNA ESPERANTISTO

kombinita abono : 7 fr. (2 S 800).

PRESA ESPERANTISTA SOCIETO

33, rue Lacépède :- Paris



Vera
 Ferhava Salo
 alsimiligobla

ELTROVITA DE
 M. Maurice ROBIN
 en 1881.

LA
Fer Robin

mirinde efikas

KONTRAŬ
 SENSANGECO,
 PALKOLORECO,
 SANGELFLUOJ
 ĈIUSPECAJ

Akcelas la nutraron kaj
 neniam mallaksigas.

Tiu ĉi kuracilo, absolute senĝusta, oni uzas laŭ la dozo de 10 ĝis 30 gutoj ĉiu mango, ĉu en loma akvo aŭ vino. La enhavo de la boteto reprezentas la daŭron de tri semajnoj ĝis unu monato da kuracado.

Por eviti la falsajojn
 POSTULU la ROBIN

VENDEJO POGRANDE:
 13, Rue de Poissy, PARIS